Donaco de Kamarado Selivanov

# LENIN

№ [redacted] 4.

◆ La Nova Epoko ◆ Moskvo ◆ 1924 ◆

# LENIN

## FUNEBRA ALBUMO

Esperantista Eldonasocio
**„LA NOVA EPOKO“**
1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5.
MOSKVO—1924.

BIBLIOTEKO
de Leningrada
Esperanto-klubo

инв. N 426

La broŝuro estas presita
en kvanto 1000 ekzempl.
en la presejo de Moskva
Asocio de Kooperativaj
Societoj ( M. S. P. O. ),
Ul. Baumana, Staro-Kirоĉny per., 4.
La kliŝaro estas afable
pruntita ĉe la redakcio
de la gazeto de M.S.P.O.
«Gorod i Derevnja».

„Glavlit“, № 22674.



**Vladimir Iljiĉ ULJANOV (N. LENIN)**
naskiĝis 22 (10) aprilo 1870, mortis 21 januaro 1924.

# Memore pri Lenin.

Ne per flugiloj de vento,
Sed per radioflu'
Flugas la fam' en silento:
„Lenin ne vivas plu!"

Ĉu oni scias kompreni
Vortojn de tia fam':—
„Nia gvidanto Lenin
Nin ne direktas jam"?

Do la funebra alvoko
De sur tutmonda tribun'
Flugu de loko al loko
En Esperanto nun.

Trans la vibranta anteno
Aŭdu nun ĉies orel'
La testamenton de Lenin
Nin kondukontan al cel':

„Proletarioj de l' mondo,
El ĉiu lando kaj lok'
Vin unuigu en rondo
Por la venanta epok'!"

Kaj per aera ondo
Flugas radiogram':
„Proletarioj de l' mondo,
Vin unuigu jam!"

N. NEKRASOV.

**Deklamita radiotelefone el la Moskva Centra Radio-Stacio Komintern la 21-an de februaro 1924.**



Lenin — trijaraĝa infano
en urbo Simbirsko.



Lenin antaŭ la revolucio 1917.



Lenin ĉe la inaŭguracio
de la monumento Marx-Engels
en Moskvo.



**L e n i n en Moskva Kremlo 1918.**




L e n i n vokas al la ruĝa fronto
por defendo de la internacia proletaria revolucio.




L e n i n en sia kabineto
kiel prezidanto de la revolucia registaro.



**Lenin**—gvidanto de la milionoj. Bildo de N. Brodski.






**Lenin.** Desegn. M. Beringov. **Lenin.** Desegn. N. Brodski.

# Lenin malsana.




Lenin ripozanta en Gorki apud Moskvo.
Aŭgusto 1923.

## La morto de Lenin.



Domo en Gorki, kie Lenin mortis.



La korpo de Lenin transportata
el Gorki al Moskvo.

# Kvin tagoj kaj kvin noktoj.

VERSAĴO de VERA INBER.

Kaj antaŭ, ol en tombon kaŝi
Por ĉiam de la homoj lin,
En Kolonhal' lin oni metis
Por tagoj kvin, por noktoj kvin.

Kaj kun standardoj, grandamase,
Ekiris ni, en nokt', sen bru',
Por vidi la profilon palan
Kaj Ruĝordenon sur la brust'.

Ni iris, malgraŭ frosto, kiu
Kun tia vipis nin sever',
Kvazaŭ kun si forportis Lenin
Varmecon tutan de la ter'.

Tiel kvin noktojn ni ne dormis
Pro tio, ke ekdormis li;
Solene kaj malgaje lumis
Gardant' honora — lunradi'.


**El unutaga literatura gazeto „LENIN".**

Tradukis GEORGO DEŜKIN.



Ĉerko kun la korpo de Lenin en Kolonhalo de la Domo de Sindikatoj, 23—27 januaro 1924.

## Lasta adiaŭo.



La ĉerko kun la korpo de Lenin sur Ruĝa placo en Moskvo antaŭ enterigo, 27 jan. 1924.

BIBLIOTEKO
de Leningrada
Esperanto-klubo

426

La Nova Epoko.


Fino.
La Nova Epoko.
La Nova Epoko.